

Thomas Moore,
La lasta rozo de somero

tradukita de N. N. 101

Nun floras de l'somero la sola
lasta rozo.
La kunvivantoj ĝiaj velkis en
mortripozo:
ne estas flor' parenca, aŭ roz-
burĝono ia,
Por ĝemojn kaj ruĝigojn redoni
al alia.

Mi ne vin lasos sole, sur la tron-
ket' plendeti
Ĉar la beluloj dormas, vi devas
kundormeti.
En morto, sen parfumo,
l'amikoj jam dormetas:
Do floron vian teren ĝentile mi
disĵetas.

Mi tiel volus sekvi se l'amikec'
finiĝus
Aŭ la juveloj brilaj de l'amular'
foriĝus:
Ĉar se la koroj veraĵ kaj dolĉaj
ne plu estus,
En la dezerta mondo volonte
kiu restus?

...

Thomas Moore,
'T is the Last Rose of
Summer

'T is the last rose of summer left
blooming alone;
All her lovely companions are faded
and gone;
No flower of her kindred, no rose-
bud is nigh,
To reflect back her blushes, to give
sigh for sigh.

I'll not leave thee, thou lone one! To
pine on the stem;
Since the lovely are sleeping, go
sleep thou with them.
Thus kindly I scatter thy leaves o'er
the bed,
Where thy mates of the garden lie
scentless and dead.

So soon may I follow when friend-
ships decay,
And from Love's shining circle the
gems drop away.
When true hearts lie wither'd and
fond ones are flown,
Oh! who would inhabit this bleak
world alone?

...

Thomas Moore,
La lasta rozo

*tradukita de Clarence
Bicknell*

Jen la lasta rozeto de fora
somer'!
Ĝiaj belaj kunuloj jam
velkis sur ter'!
Ne restas parenco, ne unu
rozflor'
Partoprenas komplete en
ĝia dolor'.

Mi ne lasos vin velki tut-
sola, ho roz'.
Iru dormi kun ili en paca
ripoz'.
Nun viajn petalojn
disĵetas mi for
Al viaj kunuloj sen viv',
sen odor'.

Tiel same volonte formor-
tus mi mem,
Se ne plu min atendus
amika manprem'.
Ĉar kiu kun koro en tiu ĉi
mond'
Volus loĝi izola sen amo-
respond'?

...

Traduko de la Angla poemo “*T is the Last Rose of Summer*” de THOMAS MOORE (*1779-05-28 – †1852-02-25) en *Esperanton de N. N. 101*.

Arg-530-2211 (2014-11-03 22:41:14)

Tiu ĉi poem-esperantigo troviĝas en <http://www.gutenberg.org/files/38240/38240-h/vol1/e01.htm>.

Verkinto de tiu ĉi Angla poemo estas THOMAS MOORE (*1779-05-28 – †1852-02-25).

Arg-530-1053 (2014-11-04 07:57:07)

Mi, Manfred Retzlaff, kopiis tiun poemon el la retejo <http://www.franks.org/fr01066.htm>. Pri la verkinto, la irlanda poeto Thomas Moore, vidu la vikipedian retejon http://en.wikipedia.org/wiki/Thomas_Moore.

Traduko de la Angla poemo “*T is the Last Rose of Summer*” de THOMAS MOORE (*1779-05-28 – †1852-02-25) en *Esperanton de CLARENCE BICKNELL* (*1842-10-27 – †1918-07-17).

Arg-530-1054 (2014-02-15 13:55:46)

Mi, Manfred Retzlaff, trovis tiun ĉi poem-tradukon en folio kun kantoj prezentitaj dum la 12a ĵarkunveno de Germana Esperanta Fervojista Asocio (GEFA), la 12-an de oktobro 1968. Pri la tradukinto vidu la retejon http://eo.wikisource.org/wiki/AEĥtoro:Bicknell_C.,_Bordigheza.